

Sennacieca Revuo

Oficiala Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda

LITERATUR-SCIENCA ALDONO

Antaŭe "La Nova Epoko"

ENHAVO:

N. BARTHELMESS: Knabo ĉe maro. Vers. —
SENHEREDIGITO: Klaskonscia laboristinfano.
 — *N. ĤREBTOVSKI*: Aŭroras. Vers. — *H.*
REMERS: La fera pugno. — *E. IZGUR*: Mi
 estas. Vers. — *E. MIĤALSKI*: Al troaj idealistoj.
 Vers. — *HERMANN PETERMANN*: Pasio.
 — *N. NEKRASOV*: Patri-ideo en la nuna rusa
 poezio. — *M. KRJUKOV*: Homlingvo, Esperanto
 kaj ilia evoluo. — *WILLY THIELKING*: En-
 tomofilaj plantoj.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (Rusio)

Administracio: R. Lerchner, Colmstrasse 1, III., Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Tiu ĉi numero de nia "Lit.-Sc. Aldono" estas kombinita el materialo nur originale en Esperanto verkita.

Kiam dekmonata infano lernante memstare piediri faras sian unuan paŝon, ĝi estas nefirma, necerteca, ŝancela, sed tiu ĉi paŝprovo jam estas pruvsigno, ke la infano baldaŭ ellernos firme stari kaj marŝi per siaj piedoj. Kiam nia "L.-S. Ald." je la deka monato de sia vivo faras la unuan paŝon sur la kampo de l'originala esperantolingva sennacieca literaturo — estas tute klara kaj sendiskuta por ni ĉiuj, ke tiu unua paŝo havas multajn mankojn: niaj originalaj verkoj eble ne estas majstraj kaj eĉ ne multe literaturecaj. Tamen ni *arogis* fari la unuan paŝon, do ni *povas* firme ekstari per ambaŭ piedoj sur la grundo de nia laborkampo. Sen arogo ne estas atingebla la celo.

Tiu-ĉi — nia deka numero konsistas *nure* el originalaj verkoj de SAT-anoj. Per ĝi ni komencas memstare efektiviĝi unu el la celoj de nia Asocio — kreadi, en plena senco de tiu vorto, la novan vere sennaciecan literaturon. Juna estas nia SAT, ne antaŭlonge ni kolektiĝis ĉiuj sub ĝian standardon. Restante ligitaj konstante kun nia porpana laboro, de la laboro inspiritaj, post laciga penplena tago, kun plumo en netute sperta mano — ni faras unuajn malnetajn provostrekojn de grandioza originala kreaĵo plenumota baldaŭ per niaj kolektivaj fortoj (ni kuraĝas ne dubi, ke ni tion *plenumos*).

Parolante pri la pure belliteratura parto de la numero, unu fakton, samtempe ĝojigan kaj domaĝigan, oni povas konstati laŭ la prezentata en ĝi materialo: relativan perfektecon de la *poezio* kaj sufiĉan moderecon de la *prozo*. Tio estas tre natura: ĉiu juna literaturo komence disfloras per lirika poezio kaj nur pli malfrue aperas maturaj fruktoj — pli serioza beletristiko, noveloj, romanoj ktp. Do oni povas konstati, ke nia esp. literaturo jam pasis sian printempan periodon: ni havas ne malmultajn tre kapablajn kaj talentajn kamaradojn, kiuj verkas senriproĉajn versojn en plene *nia* spirito. Sola k.do *Miĥalski* liveras al ni abundan kaj perfektan materialon, kiu eĉ sola faras nin riĉaj. Tio rajtigas nin esti pli postulemaj al tiu ĉi speco de verkarto — nur *modelajn* versojn ni povos enpresi en la malgrandaj bedaŭrinde kajeretoj de nia "Aldono".


Samtempe tio devigas nin esti pli zorgemaj kaj atentemaj al la provoj verki originalan prozon. Ni vokas ĉiujn k.dojn pli energie komenci tiun ĉi necesan laboron. Ja venis la tempo somera, aŭtune ni rikoltu.

Ĝis nun ne multe ni ricevas da originalaĵoj. Jen estas kelkaj, kiuj estas presotaj; skizo pri Bernhard Shaw de *M. Starr*, "Revado" de *P. Friedmann*, kaj versoj: "Mano via, cerbo mia" de *N. Barthelmess* kaj "Malavara deziro" de *J. Dimanĉa*. Tiun ĉi lastan ni estis devigitaj sufiĉe fundamente korekti.

El la tradukaĵoj estas akceptitaj por enpresado: "Homo" (M. Gorki) de *M. Ŝidlovskaja*, "Reflekso de libero" (Pavlov) de *J. Levandovski*, "Ĉujaj pasintaĵoj" (V. Ŝiŝkov) de *P. Kazanski*, "La revolucio eksplodas" (S. Faure) de *Moreno*, "La blinda lernejo de patriotismo" (U. Sinclair) de *K. Fröding*, fragm. el "Hirundlibro" (E. Toller) de *R. Richter*.

Ankaŭ ni kvitancas tie ĉi vicevon de la manuskriptoj por la aŭgusta kontraŭmilita numero al k.doj: *E. Lanty*, *E. Miĥalski*, *M. Muribo*, *M. Starr*, *H. M.*, *Jürgen Meyer*, *K. Fröding*, *Helse*, *E. Izgur*. Ĉio aperos en la sekvonta numero de nia "L.-S. Aldono".

La Redakcio.



KNABO ĈE MARO

N. BARTHELMESS

*Nun staras li dum horoj ĉe l' havena rand' en revoj,
Kun molfleksita korpo kontraŭ ŝtonmalmola fosto;
Kaj ŝajnas, kvazaŭ la venteghardita murremparo
Kun sia senanima, morta, malvarmega kvadrataĵo, —
Kru dece al tutmond' donante malestimon,
Al ĉio, kio en ni faras vivoplenon de sentad' abunda, —
Kun delikata korpoform' sin povus ligi,
Kun tiuj ĉi linioj plenesprimaj, ondumitaj,
En kiuj formiĝante nur sin montras de l' animburĝon' estontkvalito,
De l' knabo nehalte man disvolvadon floran
Bonkomentante per la forma plenriĉec' mirinda —
Bild' tiel ĉarma, kiun ofte al okulo ja prezentas
Kolora la penik' de l' artistin' Naturo,
Se oni plene ĝin percepti jam kapablas.
Kaj tamen ĉiam nova nin mirigas ĉi-apero,
Ke rekonante ni humile kapojn klinas.
Ne tuŝas lian vivan spiron grinca frostoj.
Ja se l' rigard' eĉ sonĝe, reve vagas malproksimen,
Kaptante, centrigante de la mar' maltrankvilegan muĝon,
Per ĉiuj ĉi rimedoj, kiujn al li donas lia juna forto,
Per palp' kaj flar', okul', ore'l', per freŝe vigla brusto,
Kiu prenante spiron kaj lasante ĉirkaŭjetas fluon
De sent' bonfarta kaj fier' en plukreskemo furioza;
Se ja apogas li sin sur ŝtonego, sur masiva fosto,
Kvazaŭ la kruda muro lin apogi devus, —
Jen tamen tuj vidigas tiu senŝancele surfiksita brak',
Kaj klare de la nudaj kruroj streĉetitaj la tendenoj,
Ke ne de malfortec' eksent' en li loĝiĝas;
Ke, kvankam liaj pensoj vasten ŝvebas en la spacon,
Li ne la fundon perdas, kiu portas liajn fortojn.
Ha! Kiel la venteg' la akvon kombas per siblanta vipo,
Tra liaj haroj tordas sin, ke liaj bukloj ekstariĝas,
Ektime leviĝantaj kiel la ekscitaj marondegoj,
Klakante kiuj frakasiĝas sur la murŝirmita krutbordaĵo!
En tro mallonga palt', la korpon nur fragmente kovretanta,
Li riskas spiti al malseka — glaciiga vintra pluvo,
Kreinta jam delonge sur vestaĵ' kristalajn gutojn,
Deteni kiujn penas vane densteksita lano.*

Ho kio tenas fikse lin en tiu lok', li kion revas? —
Ĉu iam enrigardis vi animon knaban la misteran,
Kiu disvolviĝante kiel la kalik' de floro la plej bela,
Je pomp' kolora, abundec' de oraj ĝermoj en printempo
Eĉ superante bone kulturitan luksĝardenon,
Kun pura, neputanta fort' komencis la luktadon,
Por malbonvolon senlumecan de ombraĵoj grizaj disforpeli,
Konkure kun radioj de l'matena sun' plej helaj
Spiriton duban kaj malfortan sencon venki?
Nur agon montras al li vivo. Li ne sentas frapojn
De pluv', malvarmo, sag' ventega sur la korpo;
Kor' lia estas larĝa, sento akceptema por impresoj ĉia,
Vastmalfermitaj estas pordoj de l'animo.
Li kion el mistera sferflustrado subaŭskultas,
Ĉirkaŭe en natur' — li ĝin avide suĉas,
Kaj ĝoje la anim' ŝveliĝas pro l'nutraĵo riĉa. —
Li vidas, kiel ŝipoj tra l'ondar' manovras,
La unuj venas kaj aliaj pasas, blekas la sirenoj,
Kaj akompanas pens' la velojn forflugantajn,
Tra vastaj maroj, spacoj en la nekonaton;
Spirite vidas li de l'fremdaj landoj multabundajn fruktojn,
Imagas sin en paradizo de l'tropikoj . . .
Kaj ŝajnas absorbitan lin penetri
La vera sunfeliĉ' de paradiz' revata. —
Jen la venteg' disblovas nigrajn fulmotondrajn nubojn, —
Ho mir', — kun sia pala bril' el la kaŝejo paŝas
Ĝis nun de l'nigra maso retenita la arĝenta luno.
Konturojn akrajn aperigas ĝi de l'pinta promontoro,
Sur fortikaĵo tie, apud lumoturo,
De l'vent' ŝirata kaj skuata, tamen firma,
Solida, nebatebla pendas ruĝa flag'.
La realec' anoncas sin, bataĵ',
Disfluas revoj de l'tropikabundo.
La ŝipoj orŝarĝitaj preterpasas, dolĉaj bildoj,
Sed senkompataj sen la sent' komprena
Al homoj helpi en mizero suferantaj.
Ho lasu naĝi ilin for kun la riĉaĵoj
Kaj amasigi ilin — la rabbitajn ortrezorojn, —
Batalas ni por nia ruĝa kredo,
Defendas samklasanojn kontraŭ maljustec'. —
Kun eta mir' rigardas luno junan homon sube
Ĉe mara bord', kun impresema sent',
Kaj mildajn lumradiojn sur lin elverŝante,
Ĝi vidas, kiel sunovarma ĉirkaŭ buŝ' rideto
Heligas trajtojn de l'enpensiginta knabo.

KLASKONSCIA LABORISTINFANO

SENHEREDIGITO

En urbeto, tra kiu fluas malgranda rivereto montara, familio tri-kapa loĝis en supra etaĝo de nealta domo. La familiestro, diligenta homo, laboris panakire kiel maŝinkonstruisto. Edzino lia estis bona mastrino, zorgis pri la hejmeca bono de ĉiuj kaj riparis difektitajn vestaĵojn. Krome ŝi dediĉis sin al edukado de sia sepjara fileto — Karl, kiu ĝis nun estis sola ido. Depost pasko la vigla knabo vizitis popollernojn. Li estis tre diligenta, lernema kaj plej kapabla el siaj klasanoj samaĝaj. La instruisto lia multe favoris lernfervoron de sia lernanto. Pro tio la knabo havis bonŝancon fariĝi multkapabla homo.

En la proksimo de ilia loĝejo staras akvomuelejo, kiun la malgranda knabo vizitis preskaŭ ĉiutage. Tie okupataj muelistoj ametis lin kaj preteme respondis multajn demandojn de la sciemulo.

Iutage la knabo rigardis scivoleme la radaron en la muelejo, kiam la muelejposedanto rimarkis lin. Demandinte lin pri lia ĉeesto, la posedanto pensis: "Tiu ĉi bubo certe povas fari ion pli utilan, ol ĉi tie mallabori". Preskaŭ ĉiutage li bezonis sendaton, kiun ĝis nun anstataŭis dekŝesjara metilernanto. "Tiu faru pli malfacilan laboron en la muelejo", diris la majstro al si mem.

— "Bone, bubo! mi zorgos ke enuo ne turmentu vin".

Tial li sendis la knabon kun komisionoj al siaj klientoj en la proksimaĵojn tiom ofte, kiom la lasta vidigis sin en la muelejo. Voleme la knabo plenumis ĉi servojn. Per tio ja prezentiĝos okazo konatiĝi kun io ajn nova.

Tiel pasis kelkaj monatoj kaj la "kristnasko" pli kaj pli proksimiĝis. La knabo tre ĝojis jam nun pro belaj donacaĵoj ricevotaj, kiujn alportos al li la "kristinfano". Antaŭ ĉio li esperis ricevi belan donacon de la muelejposedanto. Ĉar li ja oftege plenumis sendato-servojn al li. Neniam li pro tio ricevis kompenson.

Fine la tielnomata sankta vespero estis veninta. La patrino ĉi tage havis multon farenda. Posttagmeze ŝi sendis la malgrandan Karl sur la straton por povi neĝenate pretigi la donacaĵo-tablon kaj alion.

Kiel kutime li staris ĉe la maŝinaro, reve rigardante la moviĝantaj radarojn. Subite li estis elrevigita de voĉo konata al li. La voĉon de la posedanto li estis aŭdanta. Letero estis portenda al kliento, ŝuldanta monon al la muelejposedanto. Volonte Karl estis preta plenumi ĉi tiun servon. Kiam li estis reveninta, li denove estis vokata de tiu voĉo konata. Ĉi foje la vokinto ŝajnis dignon:

— "Jen Karl, mi donacas al vi tabuleton da ĉokolado, ĉar hodiaŭ kristnaska festo estas".

La knabo dankis kaj enpoŝigis la ĉokoladon. Sed anstataŭ returni sin por rigardi la radaron, li iris sur la straton. Ambaŭ manojn en la manteloŝoj, li promenis sencele. Ŝajnis, io premis kaj ĉagrenis lin.

Subite li elpoŝigis la ĉokoladon. Rigardante ĝin, li murmuris: "Kvankam mi tre volonte manĝas ĉokoladon, tamen mi ne manĝos tiun ĉi". Li ŝovis ĝin denove en la poŝon kaj daŭrigis sian marŝadon. Fine, ŝajne, li tre grave decidiĝis. Li ekmarŝis returnen, rekte al la loĝejo de la muelejposedanto. Alveninte ĉe la enirejon, li premis la sonorilbutonon. Baldaŭ aperis la posedanto ĉe la pordo, mirigita pro la subita reveno de Karl, kaj demandis lian deziron. Tiu ĉi elpoŝigis la ĉokoladon kaj redonis ĝin dirante:

— "Mi ne volas havi vian ĉokoladon!"

— "Kial?" — demandis mirege la alparolito.

— "Ĉar mi esperis pli valoran donacaĵon farinte al vi tiel multe da servoj. Estonte mi nur plenumos sendato-servojn, se vi donos al mi kompenson."

Dirinte tion, li prezentis sian dorson al la surprizito kaj foriris. Sed nun la surprizo estis for kaj tiu sinjoro, al kiu ĝis nun eĉ similaĵo ne okazis, koleriĝis. Certe li estus vangfrapinta la knabon, se tiu ne jam estus forkurinta. Malŝarĝinte la koleron per insultvortoj, li rapidege fermis post si la pordon. Depost tiu ĉi tago, Karl ne plu venis la muelejon.

La patrino estis farinta la ĉefajn laborojn por la festo. Ŝia edzo jam revenis de la laborejo, kiam Karl, ankoraŭ ekscitita, revenis. La akra rigardo de la patro tuj rimarkis lian maltrankvilon. Post afabla intersaluto la patro demandis: "Nu Karl, kio okazis al vi?". La knabo iom embarasiĝis. Tamen li ne hezitis rakonti ĉion, kio okazis. La patro seriozmiene aŭskultis. Kiam la filo estis finrakontinta, la patro tuŝetis karese liajn harojn molajn. Malgraŭ, ke la respondo kontentigis la patron, li restis serioza. Ankaŭ la rideto la tutan vesperon ne vidiĝis, ĉu la knabo esploreme rigardis siajn donacaĵojn prokristnaskajn, kaj forgesis tiun epizodon.

La simpla kristnaska soleno pasis kaj la gepatroj estis enlitigintaj sian infanon. La patrino observis la strangan konduton de sia edzo kaj demandis pri ĝia kialo. Post ioma hezito, li fine diris sincere:

— "Mia filo hodiaŭ hontigis min kaj donis al mi bonan instruon. Dekkvin jarojn mi laboras ĉe mia firmao. Kiam mi estis dungata de mia ĉefo, li ankoraŭ mem kunlaboris en malgranda laborejo; tio estas — li surmetadis laborveston kaj inspektis nin. Hodiaŭ li posedas mezgrandan fabrikan, plurajn aŭtomobilojn, vilaon en la urbeto kaj krome preskaŭ palacon en la grandurbo.

Ĉi tage mia ĉefo trairis la laborejon. Preterirante min, li haltis kaj rigardis fabrikatajn de mi laboraĵojn. Forironte, li prenis sian cigarujon kaj al mi donacis kvar cigarojn dirante: — "Jen fumu kelkajn cigarojn dum la festotagoj!" — Danke mi akceptis ilin kaj li pluiris. Nun mi hontas, ke mi ne tuj malakceptis la cigarojn. Post dekkvinjara laboro, dum kiu mi ege atribuis lian riĉiĝon, ili vere nur estas almozo. La

pagoj semajnaj, tiom malgrandaj, estis nesufiĉaj por vivtenado. Karulino, vi ja mem spertis tion! Post la festotagoj mi redonos la cigarojn, mi samagoj, kiel estas aginta mia infano“.

Lia edzino provis konvinki lin, sed li insistis pri sia decido. Ree laborante, li kun kelkaj rimarkoj redonis ilin. Je la semajnofino li estis maldungita. Do oni senlaborigis lin malgraŭ, ke li estis bonsperta en sia fako kaj dekkvinjara kunlaborinto. Kiel tiaulo li bonŝancis ricevi tre baldaŭ okupon en alia fabriko. Li eĉ ricevis pli altan salajron. Tiel infano fariĝis instruanto de sia patro.



AŬRORAS

N. ĤREBTOVSKI

*La kor' per ritmoj frapaj himnon teksas,
tra l' arterioj fluas sangtorent',
kaj mia korp' sin plengracie fleksas,
samkiel kan' movata de la vent'.*

*Matenaj ventoj faras min ebria,
la pulmoj trinkas freŝon de aer',
kaj la anim' en trema emocio
avide sorbas beloĵn de la Ter'.*

*Sed tra la cerb' la vivon refraktante,
ne belon nur mi trovas en la mond':
al Brila Or' en prozo kaj en kanto
la bankaj pastroj mesas en la rond'.*

*Ilij korpoj grasaj kaj fetoraj
kunplektis sin en fia bakĥanal',
per la kunplekt' gardante kun fervoro
la pompan tronon de la Kapital'.*

*Sed scias mi — jam flagras ruĝaj torĉoj,
jam per salut' aromas flora ĥor':
la Vivo ŝiras retojn de la sorĉoj
kaj filojn naskas por batala hor'.*

*Alvenos ili en trankvila iro
al ardaj faŭkoj de la fabrikar'
kaj kunfandinte voloĵn en aspiro
la Novan Sunon kreos por homar'.*

*La brusto spiru freŝajn uraganoĵn,
en ĝoja san' tamburu mia kor',
por povu mi kun aroj samcelanaj
ribelan Majon krei sen angor'!*



La fera pugno

H. REMERS

Estis fortega giganto, kiu produktis tiom amase, kiom povas produkti nur giganto. Ĉion sur la tero li kreis. Sed neimageble malsaĝa li estis. Ŝajnis, ke la bona disvolvo de lia staturo kaŭzis degeneron de liaj cerboĉeloj. Do li kreis ĉion por aliaj, dum li mem nenion posedis, nek ion akiris krom mizera almozosimila salajreto, tiel ke li eĉ ne povis satigi sin. Image li kutime satiĝis vidante la abundegon de l'aliaj. Lia vestaĵo konsistis el ĉifonoj jam centfoje kuneflikitaj.

Tiu giganto nekontestible malsaĝa estis regata de aro da pigmeoj, kies subulo kaj sklavo li estis, kvankam ili ĉiuokaze ŝajnige kaj hipokrite akcentis, ke li estas libera homo kun memdetermino propravola.

Ruzaj friponoj, arogaj banditoj, impertinentaj kanajloj kaj krimuloj estis tiuj pigmeoj, kiuj majstre kaj kruele sciis ekspluatadi la fortojn de l'giganto. Ili torturis lin ĝis la sango per ĉiaj ĉikanoj. La plej naŭzajn laborojn li devis plenumi, la plej pezajn ŝarĝojn treni, dum ili plenigis vicojn da monŝrankoj, dum ili aĉetis diamantojn kaj oraĵojn ĉe juvelistoj, dum ili entreprenis luksvojaĝojn alterne al la Mediteraneo kaj Alpoj, aŭ eĉ ĉirkaŭ la tuta terglobo, dum ili veturis je sia plezuro per aerŝipoj de unu kontinento al alia, dum ili pro enuado elpensis kaj inventis kaj aranĝis neniam antaŭe konatajn aventurojn kaj plezuraĵojn.

Sed la giganto ĉiam kredinta ilian mensogadon kaj ĉiam konfidinta al ilia promeso, ke iam lia sorto pliboniĝos, ne havis eternan paciencon. Ju pli ili sentigis al li sian senkompatan perforton, des pli lia cerbo komencis mediti kaj ekkoni la senjustecon de la ekzistanta sistemo.

Unuan fojon li ekdubis pri la di-vorto: "sklavo restu kiu estas sklavo", kiun ili ĉiutage metis al liaj okuloj. Kaj unuan fojon li levis la manon, pugnigis ĝin kaj skuis ĝin minace, dirante al si: "sufiĉe longtempe mi estis via subpremato. Baldaŭ finiĝos la sklaveco, kaj tiam gardu vin".

De tiam la laboro neniam plu kontentigis lin, sed nur kun antipatio kaj kolero li ĝin plenumis.

Dume la "sinjoroj de la tero" kiel nomis sin la ekspluatemaj pigmeoj daŭrigis sian agadon. Pli kruele ili ordonis nun novajn, pli akrajn labor-kondiĉojn kaj forĝis katenojn por la giganto, okaze se li ekribelos. Ili rimarkis la malpliigon de la laboremo kaj lian malkontentecon. Estante singardemaj ili intencis sufiĉe frutempe lin senpovigi. La leĝaron ili transformis tiel ke ĝi nur povis esti divenata kaj klarigata de advokato. Tre ruze kaj artifice ili agis kaj advokato ĉiam subtenas kaj apologias ekspluatiston kaj riĉulon, sed neniam laborulon. Se riskas la giganto iafaje okaze sin mem defendi kaj apologii antaŭ juĝistaro, tiam certe estus li — kvankam estante prava — kondamnata. Kaj gardistojn armitajn per gumbastono, sabro kaj revolvero ili starigis ĉirkaŭ la giganto. En la klubejoj kaj dum festenoj brilaj estante inter si ili ridis kaj mokis pri li.

Sed la giganto vidinte la novan friponaĵon rekte stariĝis, murmuris blasfemon, levis la pugnon kaj kolerege kriis: „atentu vi brutuloj, baldaŭ venos la momento, kiam mi finluktos kun vi, kiam mi frakasos vian potenc-

on. Ia mi estas multe pli forta ol vi, malgraŭ viaj pafiloj, malgraŭ viaj perfiduloj, malgraŭ viaj leĝoj kaj paragrafoj. Mi frakasos vian klasjustecon, vian ekspluatad-sistemon kaj vian regosistemon!”

Ĝis tiam ankoraŭ vane esperinte, ke iuj helpos lin, li nun konsciiĝis ke lia liberiĝo nur povas esti lia faraĵo propra. Li pli kaj pli saĝiĝis kaj ekkonis sian potencon, ekkonis ke venis la tempo de decida ago kontraŭ putrinta fisistemo de kelkaj potenculoj, el kiuj ĉiu unuopulo estas pigmeo.

Sed la pigmeoj daŭrigis senindulge sian fiagadon kontraŭ li. Kelkan friponaĵon, multan malbonaĵon li devis toleri. Kiam li riskis plendi kaj postuli tion kion li rajtis postuli, tiam ili insultis lin nomante maldiligentulo kaj anstataŭ ricevi merititan salajron por povi aĉeti panon kaj vestaĵon, li ricevis nur almozon kaj panerojn el ilia abundo. Parto el ili, nome la tiel nomataj diservantoj, konsolis lin dirante:

“La sinjoro volas tiel, li donas al vi sian favoron ke vi povu elteni kaj toleri ĉian mizeregon senplende. Do ju pli mizera estas via vivo sur la tero, des pli vi estos rekompencata post la mortiĝo en la transo”.

Kaj severe kaj hipokriteme ili levis ĉielen la okulojn kaj fingrojn:

“Ja la maljuna dio ankoraŭ vivas, tial ne perdu la esperon, kredon kaj konfidon!”

Sed la giganto malamis jam delonge tiujn trompantojn, kiuj ne estas servantoj de dio, sed de liaj subpremantoj. Kaj li ĵuris, skuante la pugnon, ne forgesi ilin tiam kiam estos veninta lia tempo — la decida momento.

Li klopodis nun sin prepari por tiu momento. Ili praktikis plej kruelan teroron, disvastigis pamfletojn kontraŭ li, en kiuj ili amasigis mensogojn kaj kalumniojn asertante, ke li laboras tro malmulte, ke li estas salajrata tro multe, kaj postulante, ke lia salajro estu malaltigata por ke ili povu resti konkur-kapablaj en la mondo, ke devu pliigi la produktado samkaŭze.

Samtempe ili diktis denove pli akrajn, pli severajn, pli sklavigajn kaj senrajtigajn laborkondiĉojn. Ili plej severe malpermesis ĉiam ribelan agon de l' subpremato kaj subpremis klerigajn kaj saĝigajn gazetojn kaj instituciojn, iun el si ili enoficigis por ke li observu kaj kontrolu la plenumon de l' ordonoj kaj ke li konvenmomente daktu novajn, necesigintajn eventuale, plej barbarecajn ordonojn. La tuton ili ĉirkaŭis per ruĝe-blua manteleto kun nigra kolumo — kaj nomis ĝin “rajtiga leĝo” — unuvorte — komen-ciĝis faŝisto-Stinnes-reĝimo. La regnestro de nun jam ne havis eron da aŭtoritateco, sed rajtis nur fermi sian buŝon kaj ĉe certa okazo diri: jes-jes, aŭ: ne-ne, samkiel azeno nur diras: i-a! Kaj ili ridis pri li kaj amuziĝis pri lia ŝajnpotenco, nomante lin “idolo pajlviro”.

Kaj la giganto? Dum miloj da jaroj li suferegis, servante kiel sklavo al ti-kiuj estis ĉe li ŝtelintaj ĉion, kiuj neniam konsideris lin homo, kiuj per plej abomenindaj rimedoj klopodis lin plene senrajtigi. Sed li nun fine plene saĝiĝis kaj konsciiĝis, ke li nun definitive devas agi. Li riproĉis al si dirante, ke iam venos la momento de la venĝo. Ofte liaj subpremantoj ridis pro liaj indigno kaj ekscitemo kaj jam serioze ne kredis lin danĝera. Krom tio ili bone sciis lian neunuecon, kiu evidente malfortigas lian povon.

Li memoris ĉiujn kruelajojn kaj kolerego plenigis lian koron. Tiam li ekstaris, ĉiuj liaj nervoj streĉiĝis, lia vizaĝo montris decidan esprimon de ekstrema energio. Li fariĝis unueca kun si mem kaj liaj okuloj rigardis

trankvile kaj memkonscie, dum radio de venko-certeco elfluis el ili. La mano pugnigis. Kvazaŭ fera bulo iĝis la pugno. Kaj lastfoje li levis ĉi pugnon feran por decida bato kaj per plena forto ĝi irakasis la fi-sistemon kaj lian ekspluatistaron. — — —

Nur tiam li liberiĝis.

MI ESTAS

E. IZGUR

Dediĉita al E. Miĥalski

*Mi estas kolora ludet' de subiro,
kanteco de Amo kaj sunaj radioj.
Pri vivo-libero mi estas sopiro,
koncert' de doloroj de hom' misteria.*

*Mi estas poeto, malvirto, profeto,
senkulp', unuiĝ' de ĉielo kaj tero,
pasio, konscio, fajrego, lumeto,
brutbesto kaj bildo de dio-hom-ero.*

*Mi estas movado de akvo fluanta
kaj ondoj ŝanĝemaj en maro senborda.
Mi estas celado al onto el anto¹⁾,
de tim' kaj esper' simfonia akordo.*

*Mi estas animo eterne senmorta.
Mi estas florado de tempo estanta.
Mi estas konscio — la forto plej forta,
Pilat'-perfidul' kaj Jezuo amanta.*

*Mi estas deziro eĉ dion subigi.
Mi estas ekstaz' de inspiro al kreo;
beleco, volanta abismojn lumigi,
spirado de floroj, portantaj pereon.*

*Mi estas sendorma akreco de sento,
rideto kaj larmo, sufero kaj ĝojo:
jen tial mi kantas pri Am'-elemento
kaj al malproksimo mi laŭdas la vojon.*

*Mi estas sablero, pigmeo kaj stelo,
punkteto en mondo, polvo malgranda:
jen tial senmorton, loĝulo de kelo, —
mi amas, alvenon de ĝi sopirante.*

*Mi estas tagtage kreinto poveca,
sed manon fortiras mi post pandonaco.
Vestita ĉifone, en ĉenoj sklavecaj,
mi spiras la brilan neteran belecon.*

*Mi estas senhejma vagulo en mondo,
malsata mizero, pelata de hundoj;
mi tamen do fajron bruligas de onto,
per revoj lumigas mi vivon en vundoj.*

*Kaj kvankam mi putras en kotaj ĉifonoj,
mi tronojn disjetas de l'reĝoj de Tero
kaj paŝas fiere mi eĉ sur la kronoj
kun kanto triumfa, portanta liberon.*

*El kie mi estas? — Ne scias, amiko.
Mi, ido de besto, al kruco golgota
direktas la paŝojn en melankoliko,
kovrite dum vojo per polvo kaj koto.*

*Putrante konstante, mi ofte disfloras
per arkoj ĉielaj, per revoj kaj sentoj:
ĉi tio — animo en kre' bonodoras
sub varma kares' de kreeca momento.*

*Mi estas serĉado de kaŭzoj estadaj
kaj strofo el rava kosmosa poemo.
Mi estas la vojo al cel' nekonata
kaj kanto ĉarmanta, neniam finema.*

(1) anto — estanto, into — estinto, onto — estonto.

Al troaj idealistoj

E. MIĤALSKI

Al K.do V. P.

Ne flugu tro en altajn, altajn sferojn,
ĉar des pli akra tiam estas fal' al ter',
ĉar troviĝante tiel longe en aer',
vi profundigās en ĥimerojn.

Ne flugu for de l' viv', de la postuloj
de l' kor', anim', moderigitaj de la mens';
ne cedu tro al fantazia logu pens',
ĉar ĝi eraras en nebuloj.

Ne flugu vante for de fundamento,
de la firmeĉ', solid', bazitaj sur faktar',
ĉar ne satigos vin transnuba di-nektar',
dum en stomak' orgenas vento.

Ne pensu vi, ke mi malŝatas flugon;
al flugo alten ne sufiĉas nur arog'
kaj se precize vi ne scias pri l' apog' —
vi rlskas trafi en la jugon.

Jes, en la jugon, jes! Vi perdos sperton,
vi perdos scion pri la vojoj de la viv',
vi, blindigite, nur parolos kun naiv',
neniam scios vi ja certon.

En monda viv' fariĝos vi solulo,
malvarmon sentos vi, trenante vivon nur,
kaj inter ni kaj vi stariĝos bara mur';
vi estos homo de formulo.

Kaj ni varios, bolos en kaldrono
de vera viv' de ĝoj', turmento kaj pasi',
partumos ni etapojn ĉiujn de soci'
kaj venos per vivad' al kono.

Kaj vi flugpendu tie, en malpleno,
for de la tera viv', ĉasante al vizi',
ĝis lasos forto vin kaj serĉa energj',
ĝis venos kruda viv-kompreno.

Aŭgusto 1918.



Pasio

HERMANN PETERMANN

— Somera posttagmezo. — — — Malproksime de la urbo, de la verktaga bruado, junulo kuŝis sur verda sunumita herbejo. Li ne vidis la helbluan lazuron de l' sennuba ĉielo, — li ne aŭdis la ludadon de petolaj ondetoj de proksima rivereto, li ne ĝojis pri la sennombraj multkoloraj floroj, kies dolĉaj odoroj ĉirkaŭondumis lin. Varmeta venteto vaganta ludadis kun liaj bukloj, — kaj skarabeto, kiu negoce preterrapidis, ekhaltis, ekvidinte la revantan knabon — kaj kapskuante malaperis inter altekreskintaj herbotrunketoj. — Muŝetoj kaj abeloj zumis unutonajn melodiojn. — — —

— — — En meditado — lia rigardo vasten vagadis, kvazaŭ serĉante ion nekonatan — en ĉielblua malproksimo. — — —

— — — Subite papilio je stranga kolorbrilego preterflirtis. Preskaŭ tuŝis lin la delikataj flugiloj. Sen pripensi — li eksaltis kaj ekĉasis la multkoloran papilion. — — — Estis sovaĝa kurĉaso. — — — Liaj okuloj

febre ekbrilis, kiam li ree kaj ree alproksimiĝis al la sopirata papilio por finfine ekkapti ĝin — sed ĉiam vane. — — — Tamen li ne ĉesigis la senŝencan kurĉason — — — kaj ne vidis, ke li dispremis per la piedoj multkolorajn, bonodorantajn florojn. — — —

— — — Kiam la sangruĝa sunglobo dronis malantaŭ malproksimaj montaroj, la junulo ree kuŝis sur la herbejo. Li ne sukcesis ekkapti la allogan papilion, — sed nun — liaj okuloj — larmplenaj spegulis la senfinan malesperon pri la sennombraj floroj, kiujn li dispremis — blinde, senŝence ĉasante. — — — Tro malfrue li ekkonis, ke nur por li ili estis florientaj kaj bonodorantaj.

Schwerte-Ruhr.

Patri-ideo en la nuna rusa poezio

3)

N. NEKRASOV

(Fino)

7. Kaj efektive — la “homeca Miraklo-Respubliko” fariĝis fakto. Revaĵo de la rusaj naciistoj, trumpetintaj pri potenco, unueca, granda, glora nacia patrio, krevis kiel veziko kaj sur la ruino de l’iama cara imperio ekkreskis io neniam vidita en la mondo. Anstataŭ la revita tutnacia parlamento formiĝis organismo, kiu tuj deklaris sin tutmonda revolucistabo. Ŝajne de sur fundo de nacia ofendego, de sur fundo de patrio disŝirita, en la ĉion ekstermanta brulego de l’intercivitana milito kaj tutmonda blokado leviĝis neforskuebla fortikaĵo de verpopola malsupro — la ĉifonproletaria hordego, nenion timanta en sia senesperigita ribelo.

La rusaj patriotoj, inspirintaj komence la tutan militon kontraŭ la “patriperfidintaj” bolŝevikoj kaj maskintaj tiel la verajn interesojn de la senpropraĵigita kapitalistaro por esence reakcia demokratio, ĉiam des pli inklinis ŝanĝi sian koleron al favoro, ju pli ili vidis, ke la intereso de la kontraŭevolucio nur vendas la “patrion” al la fremdaj “helpemaj amikoj”, kaj ju pli ili devis konstati la spontanegan kreskadon de nova potenco “rusa” ŝtato.

En tiu ĉi transira periodo estis ne malmultaj kiuj ĝustatempe komprenis tion kaj iom hezitante, sed pli kaj pli infektiĝante, finfine plene akceptis la novan bazon. Ni citu tie ĉi grandan poeton Valerion Brjusov, plene apartenintan al la malnova generacio de poetoj-simbolistoj, sed jam en 1919 ekirintan la vojon de la komunista revolucio. Certe, nomi Brjusov inter la rusaj patriotoj estus neprave, ĉar Brjusov ĉiam estis ideologo de la latina okcidenta kulturo kaj la volstreĉita ribelema spirito de liaj verkoj estis tre certe revolucia. Tamen lia versaĵo “Al Rusio” helpas al ni sekvi tiun tre subtilan reflektan de la rilato al la nova Rusio:

En la brulanta ruĝ’aroga,
Sub alilanda kri’ malbena,
En la flamanta fajra mar’ —
Vizaĝo via sorĉe loga
Vizias en la kron’ rubena
Pli supre ol ĉielnubar’.

Kaj en la hor’ de l’mondaj boloj,
Spirante tra kanona gorĝo,
Englutis fajron via brust’.

Gvidanto-lando de l’popoloj,
Antaŭe iras vi kun torĉo
El la mallumo de maljust’.

Ĉu iam tia fort’ egidis?
Ĉu io ĝian vojon digu?
Ĉu ĝi ektimu en danĝer’?
Ni faru, kion vi decidis,
Kun vi ni estu, ni glorigu
Majeston vian sur la ter’!

Oni facile povas rimarki en tiuj ĉi versoj la tutan komencan konsterniĝon antaŭ tiom stranga transformiĝo de la patrio, sed tio flatas kaj ĉion decidas la fakto, ke ĝuste ĝi fariĝis "gvidanto de la popoloj", antaŭirante kun torĉo. Nature restas nenio krom "glorigi — majeston ĝian sur la ter".

Pasis la periodo de l' t. n. "milita komunismo" kun ĝia deviga ekonomia distribuado kaj aliaj "teruraĵoj", la limoj ree dismoviĝis preskaŭ al la antaŭaj — forlasinte do tiel la "nacian malhonoron". Ruslando mem — kvankam ne en la formo de ĉefe rusa ŝtato, sed de jam kelknacia soveta federacio — ankaŭ normaligis trankvilan ekzistadon de la civitanoj, venis la "nepo" — nova ekonomia politiko — kaj jen komenciĝis spontanea "ŝanĝado de la koloro al la favoro" jam en la medio de l' antaŭaj mortmalamikoj de la bolŝevika revolucio — inter la politika elmigrintaro, fuginta kune kun la blankaj armeoj eksterlanden.

Ĝi formis sufiĉe vastan movadon de t. n. "smena veĥ"¹⁾ kaj eĉ elpensis iun sciencan teorion por pruvi tiun ĉi ŝajne malkonsekvencon, t. e. la koincidon de l' "smeno-veĥ'a" naciismo kun la soveta internaciismo.

Certe, la cetera nepacigebla parto de la elmigrintaro ne konsentis kun tia opinio kaj konservis la malnovan rilaton al la "kraĉita kaj krukumita" de la bolŝevikoj "patrio". La rusaj patriotoj ĉiam estis tutmonde famaj pro sia plej malbela insultado al sia patrio, nun ankaŭ ili sufiĉe distingiĝas pri tio.

En fatala, kvazaŭ ensorĉita rondo ili vivas, tiuj "patriotoj sen patrolando". Laŭ la tre karakteriza por la rusaj inteligentuloj kutimo ili pentas kaj plendas al la patrujo:

Vi ordonos — ni mortos tuj,
Vi ordonos — ni vivi devos.
Unuhome por vi, patruj',
Kontraŭ vi ni ribelon levos.

Ŝajne tia estas la sort',
Ŝajne tiel ordonas dileĝo;

Resonadas ĉiu vort'
En la koro kun sankta preĝo.

Estu tiel! Fatala bat'!
Dion benas ni kun humileco.
Kontraŭ frat' do batalu frat'!
Dissiriĝu l'anim' po peco!

En tiuj ĉi vortoj de Savinkov'ano²⁾ Antono Kirŝa estas la tuta animo de tiuj malfeliĉaj homoj.

8. Oni preskaŭ — eĉ ne preskaŭ, sed absolute — ne povas trovi alian rilaton al la patrio en la nuna rusa literaturo, ol la rilaton ĵus ekzamenitan. Ĉiuj ĉi specialaj kvalitoj de la nuna rusa "patriotismo" estas tre nacikarakterizaj. Vere, estas granda bonŝanco por la tuta homaro, ke la plej ekstremaj, ŝajne nepacigeblaj patriotoj-fanatikuloj — anstataŭ esti ĉefa malhepaĵo de senbara unuiĝo de la nacioj — mem enterigas la patri-ideon kaj eĉ defendante ĝin mortigas.

En la granda historia momento, kiam la problemoj pri tutmonda unuiĝo de la popoloj ĉiam pli kaj pli aktualiĝas, kiam anstataŭ privataj intereso de ĉiu aparta ŝtato komencas superi la intereso komunaj de la tuta mondo, tiu ĉi feliĉa, kvankam vere tragedia fakto estas tre grava. Per tio ĉi eble estas parte klarigebla la fakto, ke nome en Rusio komence venkis la internaciisma revolucio.

1) "Smena veĥ" — ŝanĝo de la vojmontriloj. Tiu ĉi movado komenciĝis en Prago. Nun ĝia ĉefa organo estas la ĵurnalo "Nakanune" (Antaŭtage), aperanta en Berlino.

2) Savinkov — unu el la plej aktivaj rusaj kontraŭ-revoluciuloj, rifuĝinta en Varŝovio.

Ĉiokaze, la granda tuthomara frateco, realiĝante kiel la plej alta nacia (eble pli ĝuste — popola) idealo — estas sendube granda faciligo de tiu plej ĉefa problemo de la progreso.

Unu el la plej kosmopolitaj nunaj poetoj rŭsaj Vladimiro Majakovski en sia verko "La milito kaj la mondo" pentras bildon de la venonta kun- iĝo de ĉiuj popoloj, kiam ĉiu el ili alportas siajn donacojn:

"De kies voĉo potenco
en la kanto plej sonore kunsonis!?
Rusio
koron sian
malfermis en la flama himno!"

Tio estas vero: Rusio malfermis al la nova mondo ti-kion oni povas opinii, kiel plej sanktan trezoron de nacio — sian popolan animon.

9. Mi intence ne parolis ĝis nun pri tre forta fluo en la nuna rusa poezio, nome pri la t. n. proletariaj poetoj, kies klaskonscio ĉiam direktis ilian verkadon precipe al la temoj sociaj kaj preskaŭ neniel kunpuŝis ilin kun la problemo de nacia patrio. Male, — la patrio en ilia kompreno absolute perdis ĉiujn naciajn nuancojn kaj de la komenco mem starigis sin, kiel civito de la proletariato.

Tiu ĉi ideo inspiris multajn proletariajn aŭtorojn, kiuj unuafoje ricevis de la revolucio eblon evoluigi sian mondkoncepton. Ne havintaj patrion en la katenoj de la monarkia kaj kapitalisma ŝtato, ili unuafoje ricevis ĝin en la proletaria revolucio. Nature la revolucia teritorio fariĝis ilia kvazaŭa patrolando, kiun ili ekdefendis per sia tuta entuziasmo.

Tiun ĉi specialan sennaciecan patriotismon reflektas plej bone jena poemo de Elio Sadofjev en lia kolekto "Dinamo-versoj" (1919):

Ho vi, patrin' amata! Patrino de Sovetoj!
Ho vi, lulej' de bela, ĝoja Nova Viv'.
Vi estas de liber', de lum' insul' profeta,
Alarmo al sklavar' vekata el pasiv'.

Simile al lumtur' savanta vi vin lokas,
Esperigante per brilado sen esting'...
Al la ribel' eksterajn fratojn vi alvokas,
Al la disŝir' de l'sange-fajra ring'.

El la katenoj ĥanaj de Mongol-Azio,
Monarke-caraj ĉenoj de servuta jug',
El ĉirkaŭprenoj de filistra reakcio —
Vi venis al komun' per mirreala flug'...

Mi per la korbato sentas Eternecon
Kaj venon de aliaj epokoj, nova jar'...
Mi en vibrad' de l'kord' konceptas senmortecon,
Tutmondan Unuecon de l'lingvoj kaj gentar'.

Jen ĝi estas, Romo, kien venigas ĉiuj vojoj. Dum la diversaj pas- antaj kaj formortantaj naciaj nuancoj tragedie svarmas en interbatalado kaj ĉiu el ili estas defendata, kiel unika, plej bona tipo, — la proletaria idealo rekte diras, ke post ilia morto estas venonta la eterneco de la nova epoko unulingva kaj komunhomara, eterna ne en la senco de nemoviĝeblo, sed en la senco de senĉesa plua progresado.

10. Do ni havas nun la eblon konstati, ke Rusio ne plu ekzistas, Rusio jam mortis. Ekzistas nun RSFSR = Ruslanda Socialisma Federacia Soveta Respubliko, kiu en sia esenco estas transira stadio kaj laŭ la stranga kaj feliĉa bonŝanco, pri kiu ni jam parolis, samtempe estas nacia kaj internacia.

Sed jam ankaŭ RSFSR iom post iom nebuliĝas antaŭ SSSR = Societo (Ligo aŭ Unuiĝo) de Socialismaj Sovetaj Respublikoj, kiu signis per si novan etapon al la monda ŝtato-patrio. Al ĝi apartenas la estonto, kvankam ĝi ankaŭ prezentas, per si transiran formon ĝis tiu beninda tempo, kiun tiel bone pentras al ni la anarkistoj.

Ĉiuj memoras la iutempe tre popularan devizon, kiu en la plej akra momento de la rusia revolucia milito vokis al defendo de la "Socialis-

ma patrio". Kaj jen mem trudas sin la demando: ĉu efektive la "socialisma patrio" estos "patrio"? Tiom, kiom en tiun ĉi terminon estas nuntempe enigata iu difinita koncepto ne direbla per aliaj ordinaraj vortoj, kaj tiom, kiom oni devas uzi simpligitajn esprimojn por popularigo kaj komprenigo de nova ideo, tio certe estas ĝusta. Sed esence tio estas tute malĝusta: nova ideo postulas novan vorton.

La socialismo ne estos restarigo de la pasinta mondo, la mondo de niaj patroj kun ĝi malamo, diseco kaj kaoso. La socialismo estos la mondo estonta, la mondo de niaj filoj, de niaj nepoj. La nova senco de la vorto "patrio" devas esti formita ne el la vorto "patroj", sed el la vortoj "nepoj", "infanoj" aŭ similaj. Kaj ĉiuokaze ĝi estu ne "patrio", sed "homario".

En tio ĉi estas la tasko de la nova, kreanta, proletaria poezio. Ĉar nenian konservon de la malnovaj konceptoj, falsaj kaj erarigaj, la proletariaro povas subteni¹⁾. La naturo de la proletariaro estas kosma harmonio kaj aktiva kolektivismo universala.

La estonta "patria" aŭ pli ĝuste "homaria" poezio, kiu jam nun ĝermas sur la traplugita kaj erpita kampo de la "rusa" revolucio, estos la poezio pri SSSR, poezio pri frateco, poezio pri unueco de la tuta homaro.

1) Por kontraŭpezi al la epigrafo de mia artikolo, kiu povas esti erare komprenita, mi ree memorigas tie ĉi alian citaĵon el Lenin: "nenian fikson de la naciismo la proletariaro povas subteni, — kontraŭe, ĝi subtenas ĉion helpantan al forfroto de naciaj malsamaĵoj, al falo de naciaj baroj, ĉion farantan la ligojn inter la popoloj pli kaj pli densaj, ĉion kondukantan al la kunfandiĝo de la nacioj". Ĉu do estas kontraŭdiro inter la ambaŭ citaĵoj? Evidente ne, ĉar antaŭ tiu ĉi kosmopolitismo ĉiuj nacioj estas absolute egalrajtaj, kion neniel povas fanfaroni la "demokratia" internaciismo burĝa en ĝia praktiko.

Homlingvo, Esperanto kaj ilia evoluo

(Marksisma vidpunkto)

3)

M. KRJUKOV

(Fino)

Esperanto estas lingvo vivanta kaj tial ĝi same ŝanĝiĝas. Estas tute nature, ke la ŝanĝoj en Esperanto plene similas al tiuj en naturlingvoj. En Esperanto, kiel en aliaj lingvoj, longaj vortoj kaj parolturnoj rimarkeble emas mallongiĝi. En komencanta Esperanto estis uzataj t. n. regulaj formoj: ĉio ĉi tio, tiu-kiu, ĉi tiu domo. En moderna Esperanto jam estas uzataj la pli mallongaj formoj: ĉio ĉi, ti-kiu, ĉi domo. Kaj ĉion ĉi faras ordinara esperanta publiko, kiu nenion scias pri la principo reganta evoluon de ĉia lingvo. Nur la instinkto gvidas ĝian volon. La volon, kiun instigas bezonoj de ĉiutaga vivo kaj uzado. Multaj esperantaj aŭtoroj komencas preferi pli mallongajn formojn. Estas uzataj proleta, analoga anstataŭ proletaria, analogia. Kelkaj emas eĉ anstataŭi superflue longan finaĵon de adverbo aŭ per pli mallonga kaj regula *e* (antaŭ, hodiaŭ — ante, hodie). Evidente ĉio ĉi estas sona evoluo, kiu, same kiel en aliaj lingvoj, en Esperanto rompas regulojn kaj komplikigas gramatikon. Krome — dum du jardekoj da ekzistado de Esperanto ĝin envenis multaj novaj sufiksoj (aĉ, oz, i, end, iv, iz), kiuj parte jam estas oficialigitaj. Samtempe nian lingvon invadis multaj bon-mal-bonaj novaj vortoj, kiel: organizi, organismo, pacifismo, normo, normala, astronomo, astronomio, dislokacio, anomalio, primaria ktp.

Multaj opinias, ke lingvo povas esti neŝanĝebla kaj la samon oni opinias pri Esperanto. La analizo de l' problemo montris, ke ĉi opinio estas erara, ĝi estas sekvo de nescio. La kialoj de lingva evoluo estas klaraj — ili plene respondas al evoluo de ekonomistato en homsocio. Tial mi devas kategorie kaj konklude aserti:

1. Leĝoj de evoluo en lingvo estas same nepraj kiel tiuj en homscio,
2. Sona evoluo en ajna lingvo same kiel en Esperanto ne povas ĉesi,
3. Same ne povas ĉesi kreado de tiel nomataj novaj vortoj.

Ni scias la kialojn kaj tial ni povas antaŭvidi la sekvojn de l' kialoj: ni povas antaŭvidi vojon, kiun iros nia lingvo. Pri ŝanĝoj en nia lingvo ni povas kaj devas konkludi per ŝanĝoj respondaj en aliaj lingvoj kaj teknikiloj. Por eviti miskomprenojn mi devas tie ĉi averti, ke mi proponas neniajn reformojn. Mi parolas nur pri tio, kio estas neevitebla en vivo de lingvo same kiel estas neevitebla sunleviĝo kiam la tero turniĝas. Same mi ne diros kiam la ŝanĝoj venos. La solon mi povas certigi — ili neprevenos spite al plaĉ-mal-plaĉ-oj de apartaj personoj kaj eĉ institucioj kaj venos ili ne subite, sed iom-post-iom kolektiĝante. Subita estos nur ilia oficialiĝo.

Do — mi konkludas:

1. Esperanto kiel radikala reformo de homlingvo povas esti oficialigita nur de venonta internacia (ne nacia) revolucio, kiu povas esti nur proletaria. Kaj inter naciaj lingvoj dum antaŭrevolucia tempo Esp.o estos kiel bastardo neamata kaj eĉ persekutata. La espero de multaj, ke Esp.o estos pace kaj milde, konsente enkondukota de nunaj naciaj registaroj estas sekvo de nescio kaj naiveco, ĉar neniam prilingvaj reformoj venas ekster revolucio. Ja ni bone scias, ke eĉ bolŝevikoj ne sukcesis ĝin fari.

2. Socialismo sendube igos nian vivon kaj laboron pli intensa kaj vigla kaj tial buŝlingvo emos al diversaj mallongiĝoj, kiuj abunde venos nian lingvon same kiel ili invadis nunan postrevolucion rusan lingvon (Komintern, gubpartkom — Komunista Internacio, gubernia partia komitato). Ĉi mallongiĝoj de buŝlingvaj formoj okazos kelkvoje: la vorteto ĉi estos kutime uzata sen plua tiu, tio (ĉi domo anstataŭ ĉi tiu domo); anstataŭ tro longaj kunmetitaj vortoj aperos pli mallongaj kaj internaciaj (eta anstataŭ malgranda, i anstataŭ kaj); tro longaj malnovaj vortoj (radikoj) perdos po unu meza vokalo laŭ la propono de Zamenhof mem (muskolo, orakolo, cifero — musklo, oraklo, cifro)¹); same ŝanĝiĝos tro longaj nunaj vortoj (proksima, estas, minimuma ŝanĝiĝos en proksa, esas, minma); tro longa malfaciliga finaĵo aŭ anstataŭiĝos per mallonga kaj regula e (kontraŭ-kontre); substantiva finaĵo o iĝos pli kaj pli apostrofata kaj malaperos kiel superflua (simile al rusa malmoliga signo ъ en fino de vortoj); uzado de adjektivoj adverbiĝos, ili ne akordiĝos en multenombro kun substantivoj iliaj²).

¹) La proponon Zamenhof faris en 1894, sed tute prave tiam opiniis ĝin neĝustatempa. *M. Kr.*

²) Oni povas konsideri tamen diskutenda la problemon ĉu ne ludos rolon en evoluo de Esp.o-buŝlingvo ankaŭ alia principo — facila lerneblo, celanta mallongigi tempon de ĝia ellerno; aŭ la evoluo rezultos el interefikado de ĉi ambaŭ principoj. Cetere oni atentu la konkludon 4-an de l' aŭtoro. *Red.*

3. Pro emo al vera internaciigo (ĉar la samo okazas kun ekonomio de popoloj, en Esp.o aperos novaj vortoj, similaj al tiuj de ekstereŭropaj popoloj — ĉinoj, japanoj k. a. Kaj la apero sekvas vojon de okaza koincido, ofte trovata inter vortoj hindo-eŭropaj kaj aziaj; ekz. en Esp.o kaj la ĉina koincidas vorteto in; plue — la ĉina havas la vorton go (ŝtato) kaj preskaŭ la saman (mallongigitan — gos') havas slavaj lingvoj. Esp.o jam nun havas multe da neeŭropdevenaj vortoj: amalgamo (araba), ĉokolado, kakao (meksika), teo (ĉina) k. a.; sed ili ne sufiĉas; sendube oni povos trovi sufiĉe da similaj koincidoj inter aliaj eŭropaj kaj aziaj lingvoj kaj trafe utiligi ilin por fari nian vortaron pli kaj pli internacia per sintezigo de ĉiuj homlingvoj. Kaj ĝuste pro nesufiĉa internacieco ne povos sukcesi Ido, ĉar ĝia vortaro estas tro latinigita (malmodernizita) kaj tial ĝi povas servi pli al naciaj celoj, ol al sincera internacio. Krome — gramatikaj reformoj de Ido ne estas tiom valoraj, por ke tuta esperanta popolo rompu sian lingvan kutimon.

4. Ĉiuj ŝanĝoj en lingvo racia emos havi karakteron de ĝeneraligaj reguloj. Ili iros vojon, kiu ne rompas regulojn kaj ne kreas esceptojn. Ekz. nova sufikso *i* nun havas nur geografian signifon (Sovetio, Germanio). Sed la uzado de ĉi sufikso evidente ĝeneraligiĝos, se ni donos al la sufikso signifon de lando, scienco aŭ okupo posedata de. Tiam el la radikoj *perso*, *astrologo*, *mago*, *telefono* (ilo) venos derivaĵoj — *Persio*, *astrologio*, *magio*, *telefonio* (scienco, okupo kreata de telefono) ktp. Plue — post kiam oficialiĝis sufikso *oz* la malnova fundamenta vorto *grandioza* jam fariĝas regulrompanta pro interlitero *i* (*grand-i-oza*) kaj anstataŭiĝos per la pli simpla kaj regula *grandoza*; la lasta estas jam derivaĵo kaj kiel tia foriĝas el radikaro. Ĝi estas sola vojo por tempo-al-tempo senbalastigi nian vortaron, kiu ados ricevi ĉu novajn neregulajn radikojn ĉu diversajn neantaŭvideblajn kriplaĵojn el sona evoluo. Sed mi ripetas, ke ĉiuj similaj ŝanĝoj oficialiĝos nur post ioma kolektiĝo de l'ŝanĝoj per pli malpli granda ekskuo de uzantoj la lingvon. Kaj la ekskuon kaŭzigos kompreneble ekonomiaj ŝanĝoj en homsocio — la intensiĝo de produktado, de homrilatoj ktp.

5. Novaj vortoj sendube ne ĉesos aperi en Esp.o. Sed plejmulto el nunaj novaj vortoj estas enkondukata de nesufiĉe spertaj komencantaj esperantistoj. Ili ne scias spiriton de nia lingvo kaj pro nescio penas ĉiel fari ĝin ĝuste simila al sia propra patrolingvo. Ekz. nespertuloj, tradukante el rusa lingvo, donas jenan frazon: "magnetaj anomalioj klariĝas per dislokacioj de ferhavantaj tavoloj de tera krusto", dum pli simple oni povas diri jene: "magnetaj denormiĝoj estas klarigataj per dislokiĝoj de ferhavantaj tavoloj en terkrusto". Ja estas evidente, ke novaj vortaj hieroglifoj "anomalio", "dislokacio" estas absolute senbezona kaj malsprite malsimpligas kaj latinigas nian vortaron! Ne ĉiuj internaciaj vortoj devas esti akceptataj de nia vortaro. La lasta devas esti kiel eble plej simpla kaj malgranda pro emo al ekonomio. Ne novaj vortoj, sed novaj afiksoj estas preferindaj, ĉar ili estas pli potencaj kaj ekonomiaj. Nia lingvo disvolvos internan teknikon, kiu nun estas apenaŭ tuŝita. Novaj radikoj venos nur post kiam la tekniko montriĝos ne sufiĉa. Ale — tie ĉi mi devas noti, ke ĝuste ĉi tekniko estas ege malhelpata de tro longaj nunaj esperantaj radikoj, kiuj baras kunmetadon de vortoj... Kaj novaj afiksoj venos abunde (*end*, *ko*, *iz*, *iv* kaj similaj, uzado de kiuj klaras el la ekzemploj: *ago* — *agendo*, *sinuso* — *kosinuso*, *karaktero* — *karakterizo*, *produkto* — *produktivo*). Kaj la radikoj similaj al *anomalio*, *dislokacio*, *sekundaria*, *decimala* malaperos pro neuzado, ĉar per la interna tekniko oni povas krei pli regulajn kaj simplajn: *denormiĝo*, *dislokiĝo*, *duuma*, *dekuma*.

Cio dirita rilatas al buŝlingvo. Sed ĝuste la saman vojon de plisimpliĝo kaj mallongiĝo devas iri skriblingvo. Historio montras, ke skribado ĉiam emis plisimpliĝi de tro malfacila ĉizado de hieroglifoj sur ŝtonoj ĝis la nuna kurpluma skribado sur papero. Alfabeto ne ĉesas simpliĝi eĉ en nunaj jarcentoj. La rusa montras la plej bonan ekzemplon (la malnova rusa eklezia alfabeto kaj la nova postpetra)... Tial:

1. Tro komplikaj literoj (ekz. trielementaj *m, g, k*) anstataŭiĝos per pli simplaj distingeblaj unuelementaj signoj.

2. Uzado de grandaj literoj, kiuj faras novan paralelan alfabeton (ABDH kaj abdh) ĉesos, ĉar ĝi senbezone ĝenas kompostadon kaj lernadon de alfabeto.

3. Presliteroj kaj skribliteroj samformiĝos. Nun ili absolute malutile diferencas.

4. Aperos novaj signoj (en komenco de frazoj) por montri esprimmanieron de frazoj (tono), ĉar signoj estas multe pli ekonomiaj, ol longaj postfrazaj priskriboj. La signoj montros: aserton, dubon, koleron, ironion, mildon ktp.

5. Malnova blindiga punkto estos anstataŭita de vertikala streko.

6. Diversaj mallongigoj estos uzataj sen punktoj (ktp, te, ka, tn). Anstataŭ ofte uzataj ĉar, tial, kaj povos esti skribataj solaj komencaj literoj: ĉ, t, k...

Ĉiuj ĉi ŝanĝoj venos spite al kontraŭstaro de apartaj personoj kaj eĉ institucioj ĉar ili estas gvidataj de leĝoj kaj bezonoj same nepraj kiel tiuj de homsocio!

Irkutsk, 1. X. 1923.



Entomofilaj plantoj¹⁾

WILLY THIELKING

La fekundigo de la fanerogamoj (Phanerogamae = florplantoj), kiel oni scias, okazas per transigado de viraj polenoj al la ina parto de floro, la stigmato. Ankaŭ estas sufiĉe konata, ke tiu-ĉi transigado de la polenoj aŭ florpholvoj fariĝas ofte pere de malgrandaj animaloj. Fakte la plantoj uzas krom la venton ankaŭ la akvon, plue insektojn, birdojn kaj vespertojn por sia amservo, kaj pro tio oni ilin nomas konforme: anemofilaj, hidrofilaj, entomofilaj, ornitofilaj kaj kiropterofilaj.

La serioj de hidrofiloj, ornitofiloj kaj kiropterofiloj enhavas nur malmulte da plantoj, kompare al ambaŭ aliaj. Al la hidrofiloj apartenas nur efektivaj akvoplantoj, ĉe kiuj la fekundigo okazas sur la akvosupraĵo, kiel ĉe la Valisnerio (*Vallisneria*) el la familio Hidrokaridacoj (*Hydrocharidaceae*) kun la specoj *V. alternifolia* kaj *V. spiralis*). Tiu ĉi lasta estas kosmopolita. Ĝi ankaŭ estas tre rimarkinda pro ĝia karakteriza fekundigo. Valisnerio estas dioica²⁾, t. e. la nomita speco estas dispartigata en viraj kaj virinaj ekzempleroj. Ĉi tiu planto subakva situigas nur ĝis unu metro profunde. La vira floro de la menĉiita kreskaĵo posedas nur mallongan pedunklon tute subakvan, kontraste al la virina floro, havanta longan spiralon (vidu la nomon), kiu ebligas

(1) Samtempe provo pri Esp.a botanika terminaro kaj nomenklaturado.

(2) Ĉu skriberaro? Laŭ Ch. Verax "Enciklopedia Vortareto" — dioika. — Red.

al la floro la sursupraĵan restadon. Tuj kiam la polenoj maturiĝis, la vira floro deligiĝas de sia pedunklo, supreniras kaj okaze tuŝas la virinan parton de la naĝantaj floroj, surpolvante ĝin. Baldaŭ post la fekundigo la ina floro subakviĝas helpe de sia spirala pedunklo, kaj tie la semoj maturiĝas iom post iom.

Tute aliaj cirkonstancoj estas troveblaj ĉe la *Zostera* (*Zostera*), kies fekundigo okazas subakve. *Zostera* estas la sola florpilanto subakva. Ĝia hejmo estas la marbordoj eŭropaj, malgrandaziaj kaj nordamerikaj, kie ĝi formas tutajn subakvajn herbejojn. Rimarkinde estas, ke la nomita kreskaĵo mankas ĉe la marbordo afrika.

Plej konata kaj plej ofta estas la speco *Zostera mara*, iom gramenforma kelkajara pilanto, floranta dum la monatoj junio ĝis aŭgusto. La *Zostera nana* (*Z. nana*), pilanto laŭnome malpli granda ol la ĵus menciita speco, estas malpli ofte trovebla.

La ornitofiloj estas nure tropikaj. Unu el ili estas la genro Eritrino (*Erythrina*)¹⁾, apartenanta al la familio legumenoj *Leguminosae*. Eritrino ampleksas ĉirkaŭ 30 specojn. La plej multaj el ili estas arbformaj, kies trunkoj kaj branĉoj tre ofte estas armitaj per pikiloj akraj. Ilia surpolenigo okazas pere de tropikaj sun- kaj miel-birdoj. Ankaŭ la sudamerika Tokomo (*Tocoma*) el la subfamilio Tokomeoj (*Tocomeae*) estas tute ornitofila. Ĝian fekundigon okazigas la amerikaj kolibroj.

Sed la plej karakteriza ornitofilo verŝajne estas la Markgravio nepentoida (*Markgravia nepenthoides*), unu el la 16 specoj de Markgraviacoj (*Markgraviaceae*) de Tropika Ameriko. La Markgravioj estas epifitaj, t. e. ili vivas sur aliaj pilantoj, kiel ekz. faras la preskaŭ ĉie konata Hedero (*Hedera*), al kroĉanta sin per kroĉilaj radikoj, ne forprenante nutraĵon de la pilanto surirata de ĝi.

La Kalo²⁾ marĉa (*Calla palustris*), vivanta en la torfejoj kaj marĉoj de la malnovaj terpartoj, Azio, Afriko, Eŭropo kaj plue en la Atlantika Ameriko, verŝajne fekundiĝas pere de limakoj.

La plej multaj el ĉiuj polenproduktantaj pilantoj estas anemofilaj aŭ entomofilaj. Preskaŭ ĉiujn pilantojn, kiuj havas malgrandajn solestarantajn modestajn aŭ senpetalajn florojn, oni povas alkalkuli kun sufiĉa certeco al la anemofilaj, tiom pli, kiam la samaj pilantoj produktas la polenojn amase. Al tiu speco apartenas ekz. la Amentacoj (*Amentaceae*), Korilo (*Corylus*), Poplo (*Populus*), Alno (*Alnus*), Betulo (*Betula*) kaj Saliko (*Salix*). Ĉiuj havas la grandamase polenfabrikantajn virinajn florojn, nomatajn amentoj. Estas rimarkinde, ke Korilo avela (*Corylus avellana*) en Mez-Eŭropo jam floras komence de februaro.

La polenproduktado de la du anemofilaj kosmopolitaj kaj valoraj kulturpilantoj Sekalo (*Secale*) kaj Tritiko (*Triticum*) estas tiel granda, ke dum la florado super la kreskejo de la nomitaj pilantoj vidiĝas netravedeblaj polennuboj pro la ventado.

Ankaŭ la specoriĉa Rumeĉo (*Rumex*), plue la Urtiko (*Urtica*) kaj la 76 specojn ampleksanta Taliktro (*Thalictrum*) el la familio Ranunkolacoj (*Ranunculaceae*) estas anemofilaj. Rimarkinde estas ankoraŭ, ke la anemofilaj Parietarioj kun iliaj 7 specoj uzas apartajn ilojn por aljeti la polenojn el la anteroj por transportigi ilin de la vento.

(1) Laŭ E. Boirac "Plena Vortaro" — Eritreno, speco da fabacoj (*Erythrinus*). Red.

(2) Eble Kalto (*Caltha*)? — Red.

La entomofiloj vidigas aŭ grandajn tutspeciale kaj vigle koloritajn florojn aŭ kiom ĉi-lastaj estas malgrandaj, kaj tial ne tiel bone videblaj por la insektoj, la floroj kolektiĝas, se ankaŭ ne senescepte, je kapituloj aŭ umbeloj.

Kelkspece mankas la koloraj petaloj. Por forigi tiun ĉi mankon la stamenoj kaj pistiloj estas alloge kolorigataj, kiel ekz. ĉe la aŭstraliaj Mirtacoj (*Myrtaceae*). Tiajn okulfrape kolorigatajn florphartojn oni fake nomas atentigilo aŭ allogilo, ĉiuj tiaj plantoj estas certe entomofilaj. Cetere ankaŭ malsimple konstruitaj floroj estas la entomofiloj aŭ almenaŭ la zoidiofiloj (*zoidiophyl* — animalofila). Longa tordita aŭ spirala florkolo malebligas la enigadon de polenoj, alportataj de la vento. Frapanta ekz. por tio estas la Aristolokio tuba (*Aristolochia siphon*) el Ameriko, ĉe kiu la fekundigo ne estas ebla, sen pero de animaloj.

Enirante la sferon de la florbiologio, kaj rigardante la aman vivon de la plantoj, oni estas mirigata pri la akomodemeco reganta tie ĉi. Ĉiam, kiam la plantoj bezonas por sia fekundigo la insektojn, do estante entomofilaj, tiam ili povoscias devigi animalojn je siaj servoj. La plantoj uzas eksterordinarajn rimedojn por allogi la fekundigulojn, sed la lastaj rajte postulas kompensaĵojn, antaŭ ol servi. Pro tio nova malfacila tasko solvenda stariĝis por la florportanto, kiun ĝi solvis je kontentigo de l' ambaŭ. Laŭ tio, ĉu la plantoj bezonas papilion, burdon, abelon aŭ noktpapilion, ĝi ankaŭ estas devigata konformi la koloron, ordoron kaj formon de sia floro al la respektiva besto.

Do mankas ankoraŭ la postulata materiala kompensaĵo por la surpolvigulo. Estas konate, ke la planto solvis la komplikitan problemon, disponante al la insektoj siajn nektariojn, enhavantajn sukeritan mielon, por kiu la bestetoj amservos. Plue la allogado de floro mem, kaj la ĉiam replenigataj nektarioj kaŭzas, ke la insektoj ree kaj ree vizitas la floron, ĉar nur tiamaniere la fekundigo estas certigata.

Estas ankoraŭ necese, ke ni priskribu la imponan fakton, kiamaniere la plantoj allogadas la insektojn. Ekzistas du vojoj irindaj por la floranto, nome: konsidero de la vid- aŭ de la flarsento de l' insektoj. Unuokaze ĝi realigas la allogadon per florkoloroj, videblaj el granda distanco. Ofte por tio sufiĉas simpla rimedo, ekz. reliefigas bone la blankaj kaj flavaj floroj de la klorofilportanta foliaro, tiel, ke la mielserĉanta insekto ilin certe atentigas. Oni vidu nur la ĉie konatan Sambukon nigran (*Sambucus nigra*) kaj Citizon laburnan (*Cytisus laburnum*) kun ĝiaj flavaj floroj. Sed ne ĉiam tiu ĉi simpla rimedo sukcesas, kaj tiam la planto provizas siajn florojn per ĉarma kolorbrilo, ne restante sen efiko. Tiajn kolorbrilantajn florojn ekz. portas Digitalo purpura (*Digitalis purpurea*).

Sed ni mirante ekkonas, ke la akomodemeco de la florplantoj al la insektoj atingas ankoraŭ pli altan gradon. Ekzistas multe da plantoj, kiuj al kutimiĝas al iu difinita besteto por esti fekundigata pere de ĝi. Sekve la planto devas fari specialajn koncesiojn al "sia" difinita besteto, t. e. la planto devas ornami siajn florojn per tiaj koloroj, kiuj plaĉas al la koncerna insekto. Kaj fakte, kelkaj plantoj estas luksaj kaj pompaj al siaj aromoj kaj bonkoloroj por allogi la amservantojn. Ĉi-tie ekzistas odoroj ĉiunuancaj. De naŭza kadavra odoro de la Aristolokio giganta (*Aristolochia gigas*) kaj Arumo makula (*Arum maculatum*) ĝis la mielodoro, ankaŭ por la homa nazo tiel agrabla, estas reprezentataj ĉiaj nuancoj, per kiaj estas allogebla la insekta flarsento. Necesas ankaŭ konsideri la flugtempon de la fekundigulo. Estus senutile kaj neprofite, se la floroj lukse briĵu kaj ĉarme bonodoru en tempo, kiam la insekto ripozas. Do tagfloranto ne povas influi noktpapiliojn, ĉar la lastaj dormas

dumtage. Lonicero (*Lonicera*), Melandrio alba (*Melandryum album*), Petunio (*Petunia*) kaj Filadelfo krona (*Philadelphus coronarius*), devenante el Azio, atendas noktbestetojn, tial bonodoras nur vespere aŭ nokte, kaj dumtage ilia dolĉodoro rimarkiĝas neniel. Krome oni konas plantojn alkutimiĝintajn tiagrade al la noktbestetoj, ke nur dumnokte ili efikigas siajn florojn, sed dumtage tenas ilin fermitaj.

Plue ni devas aludi al la fakto, ke kelkaj entomofiloj kiel ekz. Violo trikolora (*Viola tricolor*) kaj kelkaj specoj de Dianto (*Dianthus*) kaj Veroniko (*Veronica*) per speciala koloraranĝo montras al la vizitantaj insektoj la vojon al la nektarioj.

La montrita aro de akomodemeco botanika nun kondukas al evolua fazo, en kiu ni bone kaj klare ekkonas muŝo-, abelo-, burdo- kaj bostriko-florojn. Al la unua grupo apartenas interalie Cinanko vincetoksika (*Cynanchum vincetoxicum*), kreskanta en tropikaj Azio kaj Afriko. Malofte ĝi ankaŭ nordeniras ĝis la montaroj mezeŭropaj, kie oni ĝin konsideras venena. Ankaŭ la Orkidaco, Gimnadenio konopea (*Gymnadenia conopsea*), tiel nomata, ĉar ĝia floro formsimilas al kulspeco, estas muŝoflora.

Aliflanke estas la specoriĉa genro Salvio (*Salvia*), troviĝanta en la varmaj kaj varmetaj partoj de l' tero, kaj la 40 specojn ampleksanta Lamio (*Lamium*) el Eŭropo, Nordafriko kaj Azio, tiel ankaŭ Ekio (*Echium*) el la familio Boraginacoj¹⁾ kaj Linario (*Linaria*), precipe la bela *L. alpa*, evidentaj burdo- kaj abelo-floroj.

Kiel la papilifloron oni konas Lilion martagonan (*Lilium martagon*) el la familio Liliacoj, do tial monokotiledonan²⁾. Ĝi loĝas en Sudeŭropo, Siberio kaj Japanio, kaj portas penikan kaj kapmallevantan floron kaj verticelajn foliojn. Rimarkinde estas, ke ĝiajn orflavajn cepojn oni manĝas en Siberio. Al la grupo de la papilifloroj ankoraŭ apartenas kelkaj Diantoj. Bostrikofila estas la verda floranta dekspece Listero (*Listera*).

Estas kompreneble, ke la planto ne jam estas kontentigata, tiam la bestetoj forprenas la mielon el la nektarioj. La planto do deziregas esti fekundigata pere de la mielmanĝanto. Por ke tio certe okazu, la planto instalas specialajn mekanismojn en la floroj por garantii sufiĉan surpudrigon de la insekto. La tiel polvumata besteto forportas la polenojn al alia floro samspeca, transdonas al la stigmato iom da kunportataj polenoj kaj la fekundigo estas perfekta.

Ĝenerale la planto entomofila lokigas la polenportantajn partojn en la floro tiel, ke la mielserĉanta insekto dum sia eniro en la floron devas tuŝi polensakojn, la tielnomatajn anterojn. Kondiĉe estas nune, ke la mielserĉanto laŭcele forte estu surpolvumata per poleno. Por efike subteni tiun procedon, la planto jen kaj jen uzas iom da ruzo. Ĝi devigas la insekton iri difinitan vojon al la nektarioj kun la intenco irigi la besteton al la polenujo. Tiun ĉi celon ĝi atingas starigante ambaŭflanke de la vojo al la nektarioj akrajn haregojn aŭ pikilojn, nepermesantajn al la insektoj devojiĝon. Tiajn rimedojn uzas ekz. Leonuro heterofila (*Leonurus heterophyllus*) kaj la Krucifero, Brajo alpa (*Braya alpina*). Ĉi lasta estas planto arkta-alpa.

Ankoraŭ pli forte esprimata estas la akomodeco ĉe floroj transformantaj siajn anterojn je ŝetiloj aŭ batiloj por povi ŝeti la polenon al la insekto alfluganta. Tiun ĉi metodon aplikas ekz. la tre incitiĝema Berbe-

(1) Laŭ Ch. Verax — Boragacoj. — Red.

(2) havantan nur unu kotiledonon, t. e. parton de la migdalo, kiu preparas nutraĵon al embrio dum ĝermiĝo. — Red.

ro¹⁾ vulgara (*Berberis vulgaris*), de kiu jam vivis parencoj en la epoko terciara. La menciataj batiloj estas uzataj de la jam nomita Salvia. Ankaŭ la eksplodaparatoj de Sarotamno (*Sarothamnus*) de la Iberia duoninsulo servas samcele.

Aliaj plantoj kreis eĉ pli komplikitajn instalaĵojn, dediĉatajn al la celo fekundiga, kiel ekz. kelkaj papilionacoj: Lotuso (*Lotus*) kaj Onono (*Ononus*), kiuj elpremas el la kareno la polenon por polvumi la ventron de la insekto vizitanta.

Similmaniere estas provizata la persa Kruciano stiloza (*Crucianella stylosa*). Genia ŝetaparato ebligas al ĝi fortegan pudrumon de la insekto allogata. Cetere, ĉe Koridalo kava (*Corydalis cava*) kaj Melastomacoj oni povas trovi ŝetaparatojn de plej rafinita konstruicio. Simile kiel la diritaj Lotuso kaj Onono agas ankaŭ Asklepio²⁾ siria (*Asclepias syriaca*) kaj Cinanko vincetoksika (*Cynanchum vincetoxicum*), ili algluas la polenon al la bestkorpo. La poleno de Orko³⁾ larĝfolia (*Orchis latifolia*), Orko malkula (*Orchis maculata*) kaj Orko moria (*Orchis morio*) eĉ havas algluilojn.

Pli radikala ol la antaŭaj do agas Aristolokio klemata (*Aristolochia clematitis*), tenante la insektojn (malgrandaj muŝoj) ĉirkaŭ du tagoj en la receptaklo, ĝis kiam la bestetoj estas fekundigintaj ĝian stigmaton per la alportita poleno kaj samtempe la muŝoj estas denove ree surpolvumataj.

Tiele atingas la planto, ke ĝi plenharmone kuniĝas kun la bestoj por plenumi siajn ĉeftaskojn porvivajn, la nutradon kaj generadon. La unua parto zorgas por la nutraĵo dum la alia ebligas la fruktigadon.

Malgraŭ la riĉegeco tamen regas ŝparemo en la mastrumo de la planto. Ĝi zorgas, ke la mielo ne disperdiĝu kaj ke tiu ĉi nutraĵo ne estu ŝtelmanĝata de bestetoj netaŭgantaj por la fruktigado.

Ekzemplon, kiel efike planto sian multvaloraĵon defendas, montras la Viskario vulgara (*Viscaria vulgaris*), portante peĉ-ringon ĉirkaŭ sia trunketo sub la infloresko, per kiu estas malebligata al la suprenrampanta bestetaro atingi la nektariojn. Alian defendilon elpensis Dipsako silvestra (*Dipsacus silvestris*), kies foliingoĵoj ĉe la bazo formas akvosakojn, konservantajn pluvakvon, barantan la vojon al la nektarioj por insektoj, volantaj rampante atingi la mielon. Ankaŭ ekzistas plantoj, kiuj garnas siajn trunketojn per akraj haregoj, kiel ekz. Simfido officina (*Symphytum officinalis*). Tiu ĉi aranĝo devas servi al la sama, jam nomita celo. La reprezentantaj de la familio Kampanolacoj (*Campanulaceae*) defendas pli simple siajn trezorojn, ĉar la rando de iliaj pendantaj floroj sonorilformaj ne estas venkebla rampante.

Sed kiam la mielujo kuŝas sur la fundo de la flortubo, tiam la enhavo estas havebla nur al insektoj kun longa suĉilo.

Similajn ŝirmilojn oni konas ankoraŭ pluajn, sed la diritaĵo sufiĉas.

Nun ni devas fini. Certe ekzistas ankoraŭ pli multe da sekretoj en la vivo de niaj plantoj, pri kiuj ni deziregas paroli, sed... eventuale aliafoje.

(1) Evidenta eraro, ĉar Berbero — popolo nordafrika. Laŭ Ch. Verax — Berberido ankaŭ laŭ E. Boirac — Berberiso. La lasta formo ŝajnas esti pli bona. — Red.

(2) Laŭ Ch. Verax — Asklepiado. — Red.

(3) Laŭ Ch. Verax — Orkido. — Red.

GRAVE!

ĈU VI TRADUKIS NACILINGVEN KAJ
REPRESIGIS EN VIA TAGA GAZETO

Kio estas S.A.T.?

JUN. N.O LITERATUR-SCIENCA ALDONO LASTA PĜ.

BONVOLU SENDI EKZEMPLERON DE
L'REPRODUKTAĴO AL: ADMINISTRACIO

**R. Lerchner, Colmstr. 1111
Leipzig-Stötteritz**

Bona okazo

Por novaliĝintoj

LA ADMINISTRACIO ANKORAŬ DIS-
PONAS PRI MALGRANDA KVANTO DA

Jarlibroj 1293

AĈETEBLAJ PO EKZ. 0.70 MG. OR.
PLUS 20% SENDKOSTOJ